

***JC:** Troviĝas multaj kristanoj, kiuj repaciĝis kun la evoluciisma doktrino kaj venis al la kompreno, ke Dio pere de la evoluciaj procesoj kreis kaj daŭre kreas. Ĉu tiu ĉi tn. teisma evoluciismo damaĝas la kristanan kredon kaj la personan spiritan vivon?*

**WG:** La pensiron de la »teisma evoluciismo« mi el la biblia vidpunkto objêtas, ĉar ĝi la evangelion verdire turnas surkapen. Laŭ la biblia raporto kreis Dio per sia ĉiopovo kaj saĝo tre bonan, do plenpretan kaj perfektan kreitaron. Post tio venis la unua peko en la mondon kaj la sekvo de tio estis la morto. Pro nia morta destino Jesuo venis en la mondon por nin savi kaj alporti la eternan vivon. En la evoluciisma sistemo havas la morto komplete alian funkcion. Ĝi estas la bezonata kaj konstanta akompananto de la progresa evoluo. La kontraŭdiro kun la Biblio estas evidenta. Se oni supozas teisman evolucion, tiam Dio utiligis la malamikon, »morton«, por krei la vivon. Kaj tio estas – rigardate de la Biblio – absurda kaj kontraŭdia ideo. La ekzisto de la morto estas tiel metita antaŭ la aperon de la unua peko, kaj tiel la evangelio iĝas sensignifigita kaj senvalora. Same tiel indas pripensi: la fosilioj reprezentas la morton, suferon kaj amasan sangoverŝon. Se ili ne estiĝis pere de grandaj katastrofoj, inkluzive la grandan inundon, sed amasiĝis tra milionoj da jaroj, tio signifus, ke la morto devus ekzisti jam antaŭ la unua peko. Dum interparoloj kun la reprezentantoj de la teologia evoluciismo leviĝas evidento, ke ili multajn partojn de la Biblio ne prenas serioze, ke ili multon eksegeze turnas aŭ simple proklamas senvalida. La kompromiso kun la evoluciismo signifas, ke la centraj bibliaj eldiroj estas forĵetitaj.

***JC:** Viaj libroj »Wunder und Wunderbares« (Mirakloj kaj mirajoj) kaj »Schatzfinder« (Trezortrovantoj) enhavas multajn kredatestajojn. Interalie iu aŭstralianino raportas, ke ŝi pere de la evoluciisma doktrino fremdiĝis de la kristana instruo. Ĉu tiaj aferoj okazas ofte?*

**WG:** Tio eĉ estas la logika konsekvenco. Tiu, kiu la evoluciisman doktrinon akceptas, tiu la biblian principon laŭ la vortoj de Paŭlo: »***Mi adoras la Dion de miaj patroj, kredante ĉion, kio estas laŭ la leĝo, kaj ĉion skribitan en la profetoj***« (Agoj 24,14) ne povas plu sekvi. Laŭ miaj spertoj kun multaj interparoloj, kiel la unua falas la raporto pri la kreado laŭ la Biblio. La fakto, ke »***en ses tagoj la Eternulo kreis la ĉielon kaj la teron, la maron, kaj ĉion, kio estas en ili***« (2 Moseo 20,11) estas la unua afero, ĵetita desur la ferdeko. Kaj se oni tiun ĉi fundamenton forlasas, estas nur plu demando de tempo, ĝis multaj aliaj »domenŝtonoj« de la Biblio falos. Tiel estas kaŭzata la plej granda damaĝo ĉe la infanoj en lernejo, ja la evoluciismo estas tie instruata kiel la nura doktrino pri nia origino. La de Dio al ĉiu homo donacita donaco, la kapablo el la faroj de la kreado senerare povi konkludi je la Kreinto (Romanoj 1,20), estas tiel jam en juna aĝo detruita.

***JC:** Ankoraŭ unu demando por la fino. Kio estis dum viaj multaj vojaĝoj por prelegi kaj evangelizi via plej profunda travivaĵo?*

**WG:** Neforgesebla por mi estas prelego en la dense plena salonego de la universitato Karaganda (Kazahstano) kun la kazahstananoj, kirgizoj, tataroj,



uzbekoj kaj rusoj. Dum la dua parto de mia prelego »*Wozu gibt es Sterne*« (Pro kio la steloj?), mi indikis al tiu, kiu la stelojn kreis: Jesuo Kristo. La Kreinto estas ankaŭ la Savanto, pardonanta la pekojn. Poste mi demandis: »Kiu volas la mesaĝon de Jesuo alpreni por si persone? Kiu volas sin lasi savi pere de Jesuo?« Mi ne povis vere kompreni: mirige multaj homoj ekstaris. Ili ricevis la evangelizajn librojn kaj ĉiu po unu Biblion. Kiam ni de tiaj vojaĝoj reflugas, mi ofte pensas, kiel la aŭdita temo sekve efikos? Ĉu baldaŭ ĉio forflugas aŭ restas daŭraj fruktoj?

Du jarojn post tio ni denove troviĝis en Karaganda. Ĉe la sama universitato salutis nin profesoro Pavel Kulikov kaj nin prezentis kiel gastojn el Germanio. Mi ne povis kredi miajn orelojn, kiam mi aŭdis liajn enkondukajn vortojn:

»Mi salutas la germanan scienciston profesoron Gitt… Antaŭ du jaroj li jam troviĝis ĉi tie kaj prezentis prelegon. Mi tiam sidis meze de la studentoj. Poste okazis io, kio en tiu ĉi aŭditorio ankoraŭ neniam okazis. Per amikeca, sed decidema voĉo la parolisto nin invitis fari decidiĝon por Kristo. Kiel signon de alpreno multaj studentoj tiam leviĝis. Ankaŭ mi leviĝis de mia loko – mi decidiĝis por Kristo.« Poste li ekparolis al la studentoj: »Vi konas min. Mi dum multaj jaroj instruis la fakon 'La scienca ateismo' ĉe tiu ĉi universitato. Nun mi estas kristano. Ankaŭ vi ricevas hodiaŭ la ŝancon decidiĝi. Faru tion!«

Dio persvadis iun, kiu estis konvinkita neganto de Dio kaj dum jaroj al la studentoj helpe de sciencaj argumentoj parolis, ke troviĝas neniu Dio. Post la kolapso de Sovetunio la fako »La scienca ateismo« estis abolita kaj anstataŭita pe nova fako »La historio de ateismo kaj de religioj«. Por tiu ĉi nova fako troviĝis nenia literaturo. Tiel li utiligis mian libron »*Und die andere Religionen?*« (Kaj aliaj religioj?), kiu troviĝas ankaŭ en la rusa traduko. Kaj nun parolis la iama profesoro pri la ateismo dum siaj prelegoj pri sia kredo je Dio – kia metamorfozo! Pli poste li fondis radian misionadon por Kazahstano por tiel multajn atingi per la evangelio en la lingvo de sia lando.



Dir. k. prof-o d-ro inĝ-o
Werner Gitt


Titolo de la origina eldono: Vom Denken zum Glauben
Hejmpaĝo de la aŭtoro: www.wernergitt.de
Tradukis en Esperanton: Vinko Ošlak

Bruderhand-Medien
Am Hofe 2, 29342 Wienhausen, Germany
Tel.: +49 (0) 5149 98 91-0, Fax: -19
E-Mail: info@bruderhand.de; Homepage: bruderhand.de

Nr. 133-35 – Esperanto – edition 2021


# Ek de PENSADO al la FIDO



WERNER GITT

133-35 Vom Denken - Esperanto - Aufl 1 2021 nicht gedruckt.indd 1-5 03.02.2021 10:35:59

# Ek de pensado al la fido

**La sciencisto pri informadiko dir. kaj prof-o d-ro inĝ-o Werner Gitt (el Braunschweig, Germanio) estas konvinkita, ke ĉiuj eldiroj de la Biblio estas veraj kaj fidindaj. Per siaj libroj li ofte observas la miraklojn de la kreitaro el la naturscienca vidpunkto.**

Intervjuon kun Werner Gitt faris pastoro d-ro Joachim Cochlovius.

***JC:** Via hejmpaĝo wernergitt.de nun havas titolon forme de slogano »Vom Denken zum Glauben« (Ek de pensado al la fido). Kiel tio estas opiniata? Ĉu oni povas pere de pripenso trovi Dion?*

WG: La sukcesoj de scienco kaj tekniko dum lastaj 50 jaroj kondukis al forta kredemo je scienco. Ni pripensu nur la flugon al la luno, la diserigon de la home genomo aŭ la frapantajn progresojn ĉe komputiko. Sub tiu ĉi influo multaj apenaŭ povas trovi alpaŝon al la simpla vorto de la Biblio. Kiam Paŭlo diras: *»Ĉar Judoj postulas signojn, kaj Grekoj serĉas saĝecon«* (1. Korintanoj 1,22), ni povus tiel por la nuntempa situacio aldoni: »Nia generacio postulas sciencan verecon«. Reprezentanton de evolucio ni devas renkonti


©YinYang - istockphoto.com

per sciencaj argumentoj. Se la erarinstruo pri evolucio estas pruvita, granda baro por atingi Dion estas forigita. Se nun ni anoncas la evangelion, ne plu troviĝas fakteca bazo por siajn orelojn fermi.

***JC:** Se oni studas la natursciencajn faktojn en via libro »Faszination Mensch« (La fascino homo), oni ne povas eskapi miregon. Ankaŭ la eldiroj en la 2-a parto pri la esenco de la homo estas ekstraordinare tensiecaj. Kio estas tiel aparta en la kazo de la biblia antropologio – instruo pri la homo?*

**WG:** La **sekulara antropologio** baziĝas sur materiismo kaj tiel ankaŭ sur la evoluciisma doktrino. La homo tiel konsistiĝas nur el materio, kaj la vivo estas konsekvence klarigebla nur en la limoj de la fiziko kaj la kemio fundamentebla materia stato (*Manfred Eigen*). Okaze de tia reduktado de la realo je ekskluzive materiaj fenomenoj, restas neniu loko por transa ekzistado de la vivo post la morto. La homo estas tiel reduktita je biologia maŝino, kaj tiel lia absoluta fino estas egaligita al la morto de lia organismo. En la radsistemo de la evoluciisma mekanikismo la morto servas al la aperado de sekva vivo. Tiamaniere la valoro de unuopa homa vivo estas vidata nur kiel kontribuo al la evoluciisma progreso.

Tute kontraŭe diras la **biblia antropologio**. Laŭ ĝi Dio de la Biblio estas la kreinto de la homo. Pere de la enblovita odemo fare de la kreinto la homo posedas unu nematerian komponaĵon – la animon. Ĉar la odemo de Dio estas senmorta, ni estas koncipitaj kiel poreternaj kreitaĵoj. Tiel la korpa morto ne estas la fino, sed la komenco de la eterna vivo. Laŭ la biblia bildo de la homo tiu pro sia unua peko falis en vorticon de perditeco. Sed pere de la faro de Jesuo Kristo sur la kruco ni povas trovi la savon kaj tiel akiri la eternan burĝrajton en la ĉielo. Nian valoron priskribas Jesaja 62,3: *»Kaj vi estos belega krono en la mano de Eternulo, kaj reĝa kapornamo en la manplato de cia Dio.«*


MikeLane45 - istockphoto.com

***JC:** Vi okupiĝas ankaŭ pri la mondo de animaloj. Mi pensas ekz. pri via libro »Wenn Tiere reden könnten« (Se la bestoj povus paroli). Kiamaniere fakulo pri informadiko ricevas ideon okupiĝi pri tiu ĉi temaro?*

**WG:** La demando pri la kreado estis okaze de miaj unuaj paŝoj en la fido la plej forta defio. Tiel ĉiuj detaloj, kiuj la geniecon kaj eltrovan riĉecon de la Kreinto aparte klare markas, vokis mian intereson. Pro la nekredebla nombro de la animalaj specioj troviĝas ankaŭ grandega plureco de konceptoj, pri kiuj inĝeniero kaj informadikisto povas nur mire gapi. Preskaŭ nenion el la ideoj, enkonstruitaj ene de la kreitaro oni povas kopii. Tiel ekzemple la koncepto **OVO** estas io nefarebla. La industrio devas ĉiun dizelmotoron konstrui aparte. Se la Kreinto havus intencon konstrui motorojn, li kreus nur unu nuran, sed tiu havus kapablon elmeti la »dizelovojn«. Min fascinis ankaŭ aliaj apartaĵoj, ekz. la preciza energikalkulo por la flugo de iu speciala **birdo** (Goldregenpfeifer) el Alasko ĝis Havajo, aŭ la altgrada ekspluado de lumo ĉe **biolumineskо**, aŭ la kapablo de certaj **balenoj**, ke ili okaze de rapida leviĝo el la profundo de 3000 m ne akiras dronmalsanon.

***JC:** Via la plej nova libro »Information – Schlüssel zum Leben« (Informo – la ŝlosilo por la vivo) devus »kontribui al tio, ke la pensdevigo de la metoda ateismo en la natursciencoj estu venkita«. Por la sciencistoj kiel Isaak Newton la kosmo estis klara indiko pri la saĝeco de Dio. Kiel do tamen povis okazi la venkomarŝo de la ateismo ĝuste ene de la natursciencoj, ja tie oni la krean inteligenton de Dio ĉiutage havas antaŭ siaj okuloj?*

**WG:** La konsiderindaj sciencaj sukcesoj sur la regiono de la neviva naturo prezentis fortan allogan forton por tiuj disciplinoj, kiuj okupiĝis pri la vivo (ekz. biologio, psikologio). Pere de akiritaj progresoj de la fiziko oni opiniis, ke ankaŭ la vivo povus laŭ la sama maniero esti klarigita ekskluzive surbaze de mekanikeco. Meze de la 19-a jarcento tiel aperis disflorado de la reduktema materiismo, kiu supozas, ke ĉiuj kaŭzoj kaj efikoj estas ekskluzive fizikaj fenomenoj. Elstaraj reprezentantoj de tiu mondpercepto estis *Emil du Bois-Reymond* (1818-1898) kaj *Hermann Helmholtz* (1821-1894). Tiu formulis: *»La fina celo de la natursciencoj estas, trovi la akcelajn fortojn por la movoj, kiuj estas la bazo de ĉiuj aliaj ŝanĝoj, sekve ilin trovi en la mekaniko.«* Tiu ĉi postulo estis de multaj biologoj de tiu tempo akceptita. *Ernest Haeckl* (1834-1919) postulis, ke la scienco pri organismoj »pere de mekanikkaŭza klarigado« estu levota sur la nivelon de neorganikaj sciencoj.

Tiel ĉe la sciencoj pri la vivo estis jam tre frue postenigitaj falsaj sciencaj orientiloj. Io ne-materia laŭ tiuj difinoj ne troviĝas. Nenia miraklo, ke tiel tutmonde povis evolui materiismaj ideologioj (kiel ekz. faŝismo, humanismo, ateismo kaj diversaj versioj de komunismo, kiel marksismo, leninismo, stalinismo kaj maoismo).

Post tio *Charles Darwin* (1809-1882) rekondukis la ideon de evolucio de vivestaĵoj al la pure mekanisma principo (natura selektado) kaj tiel subtenis la materiisman premison de la biologio.

***JC:** Sur via hejmpaĝo troviĝas 12 traktatoj je dispono en pli ol 70 lingvoj. Kiamaniere vi venis al tiel ampleksa laboro super la traktatoj? Ĉu la traktatoj ankoraŭ korespondas kun la nuna tempo?*

**WG:** En nia hodiaŭa kaj per informoj inundita socio nur plu malmultaj homoj legas dikajn librojn. Tiel laŭ nia sperto adekvate faritaj traktatoj bone kongruas kun nia medio. Se traktato estas tro mallonga, tiam la esenco de la evangelio ne povas esti prezentita sufiĉe komprenebla. Montriĝis, ke 8 ĝis 10 paĝoj en la formato 21 cm x 10 cm estas ĝuste optimumaj. Temoj kiel ekz. *»Kiamaniere mi atingas la ĉielon?«* aŭ *»Kiu estas la kreinto?«* povas esti klarigitaj elĉerpe kaj tamen ili povas esti tralegitaj dum kelkaj minutoj kaj esti ĉe pluraj situacioj (ekz. en la receptejoj en hoteloj, en vendejoj, en postoficejoj) facile kolportataj. Oni povas ilin dissendi en kutimaj leterkovertoj. Kun tiu ĉi koncepto ni komencis labori en la jaro 1003. La postuloj restis ĝis nun sen perdoj. En la jaro 2016 estis dissenditaj ca. 850.000 ekzempleroj. La tuteca eldonkvanto de 12 diversaj traktatoj en la germana kaj aliaj lingvoj estas proksimume 12 milionoj.

Kia estis la komenco de ĉio-ĉi? Kiam mi estis alparolita de iu kunlaboranto de Missionswerk Bruderhand, ke mi skribu traktaton, mi tion malakceptis per la vortoj: *»Mi jam havas sufiĉan laboron verkante miajn librojn…«* Ĉe sekva okazo mi denove estis konfrontita kun tiu ĉi demando – kaj tuj mi tion denove malakceptis. Ĉe la tria okazo mi cedis subkondiĉe, ke mi skribu unu nuran. Tiel mi pri la afero pensis: Kiu temo do estas la plej grava? Mi decidiĝis pri la temo *»Wie komme ich in den Himmel«* (Kiamaniere mi atingas la ĉielon?). Post mallonga tempo la unua eldonkvanto estis diskolportita kaj oni devis ĝin aldone presi. Baldaŭ ankaŭ la dua preskvanto elĉerpiĝis kaj ankaŭ la unua eldono en la rusa lingvo estis same sukcesa. Pastoro *Heinrich Kemner* (1903-1993) ofte citis la frazon: *»Wir schieben nicht, wir werden geschoben!«* (Ni ne puŝas, ni estas poŝataj). Nun mi rekonis, ke Dio min evidente puŝis al tiu ĉi laboro.

133-35 Vom Denken - Esperanto - Aufl 1 2021 nicht gedruckt.indd 6-10 03.02.2021 10:36:10